

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1970

22-a IFEF-kongreso



Rimini la kongresurbo 1970

Ĝis baldaŭ en Rimini

Jam post kelkaj monatoj okazos la tradicia kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Kredeble la nombro de la germanaj partoprenontoj estos pli granda ol kutime, ĉar kongresurbo estos Rimini, la vaste konata banloko ĉe la adriatika marbordo.

Reklami ĝenerale la naturajn belajojn de Italio kaj speciale de Rimini ŝajnas esti nenecese. Ĉiu vojaĝagentejo varbas pri la itala sudo, kaj rekonitaj gazetoj dediĉas laŭdoplenajn artikolojn al la temo Rimini.

Tamen nin esperantistojn instigos alia motivo ol nur la fakto esti unu el dekmiloj, kiuj frekventas la longan, larĝan strandon. Ni kongresos tie de la 16a ĝis la 22a de majo 1970.

La historio de Rimini komenciĝis jam antaŭ Kristo. Cesaro, la romia imperiestro, apelaciis tie al siaj trupoj antaŭ ol li daŭrigis sian venkomarŝadon al Romo. La triumfarko de Aŭgusto memorigas, ke tiu imperiestro tre multe ŝatis tiun lokon. Tiberio, alia imperiestro, konstruigis la ciklopan kvinarkan ponton, super kiu rulas ĉiutage la trafiko, nun ankoraŭ post 2 000 jaroj. Dum la mezepoko ekfloris en Rimini fama skolo de pentristoj. Iliajn freskojn ni povos rigardi en la preĝejo de la Sanktulo Aŭgustino. Komence de la 14a jarcento fondiĝis la dinastio de la Malatesta. Ĝi respondecas la iom troigitan artan gloron de tiu urbo. La dinastio postlasis la renesancan Malaltesta-templon.

La detruoj dum la lasta milito preskaŭ ne plu estas rimarkeblaj. Nuntempe Rimini havas inkluzive la antaŭurbojn 90 000 enloĝantojn, 1 500 hotelojn, 20 km longan strandon, grandan stacidomon, flughavenon kaj ĉiuspecajn distraĵojn kaj sporteblojn. Kaj la prezoj? Ili ne estas tro altaj, precipe ne dum la kongresmonato majo.

Tri ekskursoj staras sur la programo. La unua celas al **San Marino**, 24 km malproksime de Rimini, kun siaj 64 km² kaj 13 000 enloĝantoj ĝi estas la plej malgranda kaj laŭdire la plej malnova respubliko en la mondo. Kiel respubliko ĝi estis fondita jam en la 4a jarcento de dalmatia eremito. La fakton, ke ĝi travivis ĉiujn konfliktojn de la mezepoko, ĝi dankas malpli al sia kuraĝo, sed pli multe al sia sperta, ruza sinteno. Depost

1862 San Marino staras oficiale sub la protekto de la ŝtato Italio, eldonas proprajn poŝtmarkojn kaj monerojn kaj atendas la turistojn.

Alia ekskurso kondukos la kongresanojn al **Ravenna**. Inter la 5a kaj 7a jarcento Ravenna estis la metropolo de la okcidentromia, poste de la orientgota kaj fine de la bicantina regno. Tio estis la periodo de ĝia plej granda gloro. Tipa ekzemplo por la miksita bicantina kaj frukristana konstruado en Ravenna estas la preĝejo de la Sanktulo Vitalo. La tieaj mozaikoj estas samtiel unikaj kiel mirindaj. Apud la katedralo, ŝanĝkonstruita en 1700, troviĝas la baptejo el la 5a jarcento. En Ravenna la poeto Dante trovis la versojn de sia mondfama „Dia Komedio“, kiu estas tradukita ankaŭ esperanten. Tie troviĝas ankaŭ lia tombo. Alia vizitinda tombo, apud la urbobordo, estas tiu de la orientgota reĝo Teodoro, konstruita laŭ ties propra deziro en la 6a jarcento.

Kion diri pri **Bologna**, celo de la tuttaga ekskurso? Ĝi validas — por citi turisman libron — kiel centro de la riĉeco, scienco kaj artista agado tra la jarcentoj. Bologna estas la antikva ĉefurbo de la Provinco Emilia, sidejo de la plej malnova universitato en Eŭropo kaj ankaŭ de fervoja direkcio. Fine de la 10a jarcento ornamis pli ol 200 altaj turoj la urbon. Du konserviĝis nur. El tiuj unu havas la respektindan altecon de preskaŭ 100 metroj, la alia estas kaduka kaj klinita. Bologna abundas je renesancaj palacoj. Famaj estas la artgalerio, la multnombraj arkadoj kun siaj elegantaj magazenoj, la puto de Neptuno sur la samnoma placo kaj preĝejoj el la 12a jarcento. Eble la kongresanoj gustumos la vaste konatajn produktojn de la bologna kuirarto. Ĉiukaze tiu ekskurso estas promesplena kaj digna fino de la kongreso.

Kompreneble la 22a IFEF-kongreso havos ne nur turisman karakteron. Pli kaj pli elkristaliĝas la faka akcento kaj oficialaj aranĝoj. Tiuj programeroj aparte interesas la aŭtoritatojn. Kontribuu al la pliboniĝo de nia prestiĝo kaj aliĝu kiel eble plej baldaŭ por la tuta daŭro de la kongreso. LKK kaj la ceteraj instancoj klopodos plenumi viajn dezirojn.

W. Barnickel

Niaj najbaroj

La du pasintaj numeroj de Bulteno temis ĉefe pri nia jarkunveno; la du venontaj unuavice informos pri la internacia kongreso de IFEF. Inter niaj ĉiujaraj renkontiĝoj ni volonte rigardas jen kaj jen trans la barilon aŭ vizitas mem la najbaron. Per tiu ĉi unua Bulteno de la nova jaro ni raportas kaj anoncas pri jarĉefkunvenoj de FERN, FFEA, BAEF, AFEF kaj DEFA.

Nederlando

La imagon pri kampara idilio kun klakantaj ventomuelejoj seniluziige detruas la vojaĝo en la nederlandan orienton. Vigle pulsanta vivo, pratempaj metioj apud energiplena juna industrio, novaj urboj kun antikvaj nomoj; historiaj juveloj proksime de novaj kvartaloj eksplode kreskantaj, racie mekanigita agrikulturo antaŭ usonece impresantaj fonsiluetoj, surprize kaptas atenton, vekas admiron. Rapidaj trajnoj laŭ fiksa horaro en duonhora intervalo interligas loĝkolojn kun la centroj de komerco kaj industrio. La modernecon de la nederlanda fervojo respegulas ĝiaj sekuraj linioj, ĝiaj luksaj vagonoj kaj rapidaj trajnoj, sed malpli ĝiaj stacidomoj, kiuj pompetas tradicie konservative en la peza masiva stilo de pasinta bel-epoko.

Progresiva tamen aspektas la servo por la fervojaj klientoj. Pli ol alilande oni jam enkondukis piktogramajn bildsimbolojn: kiel amuzajn rebusojn por gajaj vojaĝantoj, kiuj ne kutimas decifri hiroglifojn, kiel bildskribon por modernaj analfabetoj, kelkfoje ankaŭ kiel konfuzajn kriptogramojn por fremdulo el fora kamparo. Sed tio certe ne estas fervoja, nek nederlanda problemo. Tamen ĝis nun nur en Nederlando ni trovis ekzemple instrukciojn esperantlingvajn en ĉiu publika telefonejo. Ĉie cetere oni afable pretas helpi anglalingve, se rimarkiga interkomprenaj malfacilaĵoj, tiel en Amsterdam, kiel en ĉiu alia metropolo de niaj kontinentoj.

Post tondra rulado trans la Mervedeponton nia trajno haltas en Dordrecht, kie okaze la jarkunvenon de Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda ni intencas refreŝigi amikajn rilatojn, akceli la kunlaboron inter niaj landaj asocioj, profiti el spertoj kaj intersanĝi ideojn pri estontaj agadoj. Afablan akcepton en la stacidomo sekvas revidaj salutoj: FERN-prezidanto Labordus, svelta kiel konata de jardekoj; ĉiam bonhumora kaj sprita IFEF-prezidinto de Jong, ankoraŭ same vojaĝema kaj agema en la fervojista mo-

vado; amiko Look patrece simpatia; kolego v. d. Schulp, loka organizanto de la kunveno, viglas en ĉiuj anguloj, salutas, informas, administras, loĝigas, aranĝas kun evidenta sukceso, je kontento de ĉiuj partoprenantoj; fine ne laste gesinjoroj van Leeuwen, offfoje ŝataj gastoj en niaj jarkunvenoj de GEFA. Jen la estraranoj, multaj maljunaj fideluloj, la gastoj el Belgio kaj Germanio, sed aliaj, kiujn ni esperis revidi, ne estis venintaj. Malfrusomera sunbrilo el poŝtkarteca ĉielo favoras laŭprograman ŝipekskurson en la unua tago, la 11-an de septembro. Instrua vojaĝo preter argan-ekipitaj kajoj, vicoj da trenŝipoj, sportantaj velboatoj, ŝipkonstruejoj, tra sub filigranaj pontegoj, sur la akvo el centoj da riveroj, kiu kolektiĝas en tiuj ĉi fluejoj de Amer kaj Mervede. Dume la ekskursantoj babilas, promenas, lunĉas, diskutas, ĝuas la agrablan, amikan atmosferon kaj la plej belan el la lastaj somertagoj. La celo de nia vojaĝo „Biesbos“ akvoriĉa marĉregiono, prezentas eldoradon por birdoj kaj akvoturistoj. Post ekscitaj dudek minutoj da hezita flosado super daŭre sondata fundo, tamen abrupte finiĝas la veturo sur sabla malprofundaĵo. Kiu volas kredi tiun prokrastan eventon parabola epizodo, tiu povas certece esperi, ke ankaŭ la Esperanto-ŝipon baldaŭ liberigos alflua tajdo el kateno de stagnado. Malmulte da tempo restas por la rondveturado tra tiu antikva, pitoreska urbo, situanta meze en historia tereno, kiun ĉizis kaj fendis la granda inundo de 1421, kiam la maro ekstermis 72 vilaĝojn.

En la restoracio de la moderna sportcentro Wielwijk la komuna manĝo estas preparita, kiu kunigas la ekskursintojn ankoraŭ por du agrablaj horetaj. Same tie la postan tagon renkontiĝis estraro, aktivuloj kaj gastoj por la esenca laborakunsido. La bonajn dezirojn de Belga Esperanta Fervojista Asocio kunportis k-go Steenhout, de multaj jaroj ankaŭ fidela amiko en nia jarkunveno. Salutojn de la IFEF-estraro transdiris k-go Brandenburg, kiu samtempe kiel reprezentanto de GEFA eksplikis kelkajn ideojn pri komunaj problemoj kaj ties eblaj solvoj. La prezidanto verve traktis la tagordon kaj en la vigla diskuto ankaŭ la gastoj partoprenis. Leterkursoj, programitaj instrumentodoj, feriokursoj, spertoj pri varbado, fakprelega laboro kaj ties evoluo i. a. estis la temoj, al kies diskutado la germana reprezentanto

povis kontribui aktualajn informojn. Ne definitive traktita restis la projekto de limland-renkontiĝoj, kiaj en antaŭaj jaroj jam okazis en Enschede, Gronau, Aachen k. a. Jen speciala tasko por la limdirekcioj Münster, Essen, Köln.

La malnova estraro de FERN, kies ĝisnunan aktivadon oni danke akklamis, restis oficanta en la sama konsisto. Gratumulojn ankaŭ de GEFA kaj multajn bonajn dezirojn por sukcesplena nova laborperiodo. Ni povas esperi, ke dum la venonta jarkunveno en Zwolle pli da vizitantoj el nia asocio trovos okazon ĝui la gastamecon de la okcidentaj najbaroj.

Francujo

Ne ĝenitaj de ia striko ni forlasis ĉi-foje la benitan landon. Sur la dogandeklaracio sub la rubriko „Kion vi eksportas“ povus aperi nur unu vorto: „Gripon!“ Malforta konsolo, ke laŭ gazetaro 12 milionoj da francoj suferas je sama malsano. Tamen la Metro-trajnoj ŝajnas plenaj kiel ĉiam. Sed neharditajn provincojn en tiuj unuaj parizaj vintrotagoj skuas la daŭra alterno inter bakforneca ŝvitigo kaj malseketa frosto. La varma amikeco, per kiu la francaj gekolegoj akceptas la eksterlandajn gastojn de sia jarkunveno, dum momentoj malgravigas veterajn obstaklojn.

La Ĝenerala Kunveno de Franca Fervojista Esperanto-Asocio kunigis la 6-an kaj 7-an de decembro 100 gekolegojn el 6 landoj en Parizo. Pro avizita estrarŝanĝo kun intereso atendita la decida plenkunsido okazis en la florornamita salonego de franca fervojista Unuiĝo Arta kaj Intelekta (UAICF, kiu respondas al nia BSW). Ke la esperantistoj havas bonan pozicion en UAICF, tion pruvis la ĉeesto de ties ĝenerala prezidanto s-ro Pahin kaj liaj evidentaj elkoraj vortoj, kiujn li direktis al la kunvenintoj. En Avignon estis profunde impresinta lin la amika etoso inter la gekolegoj el tiom da landoj. Li opinias Esperanton taŭga rimedo por batali kontraŭ rasismo kaj ŝovinismo.

FFEA-prezidanto Delaquaize estis deklarina sian demision el tiu posteno, kiun li, transpreninte ĝin por unu jaro, plenumis ses jarojn lerte kaj energie, tamen kun tiuj takto kaj netrudemo, kiuj ŝatindigas lin al liaj gemikoj. Ankorau liaj adiaŭaj vortoj konigis lian psikologie modernan koncepton. Li ankaŭ prave atentigis pri la granda, zorginda trezoro, kiun konsistigas la gelernantoj de nia lingvo; kia problemoj, konduki ilin de

unua burĝonanta intereso ĝis aktive mebreco.

La longan vicon de salutantaj gastoj komencis la sekretariino de IFEF s-ino Kruse dankante i. a. pro la elstara evento de la kongreso en Avignon. Kolego de Jong memorigis la refondiĝon de IFEF, kies tiama kerno estis Parizo kaj Amsterdamo. Kiel landaj reprezentantoj ŝalutis la kolegoj Huber (Austrio), Steenhout (Belgio), Barks (Britujo), Becker (Nederlando). Por GEFA k-go Brandenburg esprimas dankon pro invito kaj gastigo. Parizo ĉiam denove lógas, ne nur pro ĝia renomo kiel monduro, kiel kultura kaj historia centro, sed ĉefe pro la amikeco ĉiam trovebla en tiu ĉi rondo. Li dankis pro la bonaj rilatoj inter la du asocioj, kiu rezultigis la multlateran kunlaboron: paskon en Strasburgo, en la komitato kaj komisionoj de IFEF, laste pro la kongresa fakprelego aperinta kiel germanlingva broŝuro. Kun plezuro li memoris pri la ĉarma gesto, per kiu Hubert Bernier en Augsburg kompensis la maltrafitan vinon de Chateauf-neuf-du-Pape (v. Bultenon 4/69), savante tiel la honoron de FFEA.

Dume okazis la balotado destinanta la estraranojn, kiuj en postaj kunsidoj inter si elektis siajn funkciojn: s-ro Ville-neuve (prez.), s-ro Bernier (vicprez., eksterlandaj aferoj), f-ino Lhermitte (vicprez.), s-ro Coyac (kas.), s-ro Audureau (sekr.) kaj kvin membroj. La bultenon prizorgos kvinpersona komisiono. Raportoj, protokoloj pruvas, ke ĉie niaj problemoj egalas, nur solvojn oni provas diversmaniere, kio estas instrua por la gastoj el aliaj asocioj.

Sabatposttagmeza komuna promonado plejble evitis la neĝkaĉon, kiu kovris tut-Parizon. Vizito al la Conciagerie, konata ĉefe kiel malliberejo de la granda revolucio, malpli kiel la resto de iam fortika reĝa kastelo, sur kies loko hodiaŭ fieras la impona, sed ne bela justicpalaco. La obskura malhelo en haloj kaj keloj, eĉ la nur malmultaj rekvizitoj de la revolucio peras ankorau post 180 jaroj aktualan impreson pri la atendejo por la eŝafodo. Ankaŭ restinta el la iama reĝkastelo, feliĉe bonege konservita, sed, bedaŭrinde ĉirkaŭita de stilfremdaj konstruaĵoj de la sama justicpalaco estas la unika juvelo de gotiko Sainte-Chapelle. Ludoviko IX. konstruigis ĝin en nur 33 monatoj, absoluta rekordo konsidere la jaron de inaŭguro 1248, kio malflanke rezultigis tian vere maloftan purstilecon. Amiko de Parizo scias, ke

oni devas viziti la Sanktan Kapelon dum sunbrila somera tago por ĝui la tutan kolorskalon de ĝiaj altaj, sveltaj fenestroj. La plej multaj el la 1134 bibliaj scenoj, prezentitaj tie per multfaceta vitro, originas ankoraŭ en la 13a jarcento.

Tre plaĉis la distra vespero kun folkloraj dancoj, kiujn montris la gejunuloj de FFEA, kaj kun am-uza skeĉo de Emilija Lapenna „Amo dum la jardekoj de homa vivo.“ La socian eventon de la jarkunveno oni povas nomi la dimanĉan bankedon; ĝi kunigis ĝuon kaj gajon en maniero, kian la vojaĝanto trovas nur en Francujo. Ne hazarde ĝi finiĝis per improvizita kvazaŭ-kabared-programo. Nova kulmino kaj jam adiaŭa kunveno: unuhora filmprezento, kolora, sperte sinkronizita kun muziko, nekritikebla esperantoteksto kaj originala sonreproduktio pri nia kongreso en Avignon.

Jam sabaton la epidemio kaptis siajn unuajn viktimojn el inter la gekongresanoj. Amikaj kisetoj helpis la rapidan distribuon de la baciloj en ses landoj. La

Kiel gasto en la Ĉeĥoslovakio

Estis mia intenco, viziti geedzojn en Bulgario, kiujn mi konas de Avignon. De mallonga tempo mi korespondas kun kolego el Ĉeĥoslovakio kaj fraŭlino kiu estas dietflegistino krome kun instruisto el la sama lando. Kiam eksciis la kolego, ke mi volas viziti Sofion, li tiel kore min invitis, ke mi vojaĝis al Cheb, kie li atendis min kun sia edzino post kvarhora vojaĝo de la hejmloko. En Cheb loĝas lia fratino, kie ni tranoktis, antaŭe ni vizitis Francisbad, ĉie tre impresis min la kora amikeco!

La alian matenon kolego Gustav veturis ĝis la stacidomo Sobéslav, kaj atendis la alvenon de la instruisto, kiu en siaj leteroj ankaŭ petis, ke mi nepre devas viziti lin kun la familio. Ĝis nun li lernis Esperanton sole el libro kaj ne havis eblecon paroli kun iu. Ankaŭ lia tuta familio kun ĉiuj parencoj estis tiel gasta. Ĉion ili donis al mi, pri kio ili kredas, ke tio mankas. Oni havis por mi

ĉiam tempon, kvankam la edzino ankaŭ eksterhejme laboras; ŝi trovis tempon por la infanoj kaj ludis kun ili aŭ muzikis kune!

La kastelo Hluboká estis grandioza! En la loko Tréboŭ ni vidis la tombon de Schwarzenberger, kaj mi ankaŭ devis admiri la plej grandajn Rosenberg-fiŝlaĝojn. Unu semajnon mi restis en la feliĉa familia rondo. Ĉiuj akompanis min, feste vestitaj, ĝis la stacidomo. Kolego Gustav atendis min en Prag. Ni marŝis tutan tagon tra la historia urbo. La alian tagon ni veturis al la dietflegistino. Antaŭ la malsanulejo mi demandis fraŭlinon sur la strato — la hazardo volis, ke estis ŝi mem! Sed ankaŭ ŝi neniam antaŭe parolis Esperanton. Kolego Gustav veturis hejmen kaj Heda devis nun kun mi paroli, kaj mi devas diri, ke ŝi tion faris bone, post kiam ŝi venkis la timon. Vespere mi veturis ĝis Hradec-Kralove, kie Gustav denove atendis min. Je la 14a de

dato 24.—25. 10. 1970, elektita por la venonta jarkunveno en Tours apud la bela romantika Loire, jam preskaŭ garantias, ke neĝo, gripo kaj tiaj obstakloj ne malhelpos praktiki denove tiun agrablan bonvenigan salutadon.

Britujo

Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (BAEF) havos sian jarkunvenon la 20-an de februaro en Londono. Prezidanto H. Barks kore invitis ĉiujn anojn de IFEF.

Danlando

La Ĝeneralkunveno de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA) okazos en Odense la 14-an de marto 1970; rezervu jam la tagon!

Aŭstrio

Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista invitas al sia 10-a Jubilea Jarĉefkunveno la 18-an kaj 19-an de aprilo 1970 en Salzburg kun varia amuza, kultura kaj turisma programo. Aligojn direkti deĵorposte kiel EDS al k-go Toni Huber, Zugfltg. Salzburg, OBB. wbr

oktobro 1969 mi vojaĝis ĝis Svoboda; la fincelo estis la Sněžka. Kiam ni grimpis supren estis nebulo kaj forta vento, sed tiam venis kiel ĉiun tagon la suno kaj brilis varmege. La lasta tago venis, kaj malvolonte mi forveturis de la karaj homoj, kiuj min tiel sincere gastigis. Ĝis revido geamikoj! H. Trumpf

Nekrologo

La 2an de novembro 1969 mortis Oskar Bredermann el EBlingen (distrikto Stuttgart). Kvankam 72-jara li ankoraŭ partoprenis aktive niajn kunvenojn. Ĉiam li estis bonvena gasto en niaj jarkunvenoj en Laupheim kaj ek de jaroj li partoprenis la Europaferiosemajnojn en Svislando. Li gvidis kursojn en EBlingen kaj tradukis popolkantojn en la Internacian Lingvon. Ni dankas al nia membro pro la fideleco kaj kunlaboro. Al la familianoj de la mortinto ni sincere kondolencas GEFA

Nova gvidanto por junularaferoj

La ĝisnuna komisiito J. Günter Doliwa, ekŝiĝis el la fervoja deĵoro. Laŭ propono de distrikto Wuppertal GEFA komisiis en Augsburg la 25-jaran Klaus Hegenberg, stacio Schee (distrikto Wuppertal kun tiuj taskoj. De 1967 li estas GEFA/IFEF-membro kaj lernis Esperanton en kadro de popolaltlernejo Schwelm. Li partoprenas regule la grupvesperojn; li vizitis la du lastajn IFEF-kongresojn en Varna kaj Avignon; ankaŭ en Neustadt (Weinstrasse) kaj Augsburg li ĉeestis. Kiel nia plej juna estrarmembro li reprezentis nian junularon en la jarkunveno de FFEA Paris. Ni deziras al Hegenberg bonajn sukcesojn kaj fruktedonan laboron por nia komuna celo.

GEFA



Klaus Hegenberg

Denove feriosemajno en Nederlando

Nia nederlanda kolego Blaauw el Zwolle informis nin, ke li post dujara paŭzo estas preta organizi en la semajno de 29.8. ĝis 5.9. 1970 feriosemajnojn en somerdomoj en Wernep. La prezo por la tuta aranĝo estas 125 nederlandaj guldonoj. Ĝi enkluzivas 21 manĝojn, diversajn aŭtobusekskursojn kaj enirprezojn en la muzeoj en Arnhem kaj Amsterdam. La dormĉambroj estas 4-, 6-kaj 8-litaj. Ĉiuj manĝoj okazos en granda kantino. Estas loko por 80 partoprenantoj. La feria loko troviĝas en arbaro en la proksimeco de Zwolle. Ĉiuj partoprenantoj zorgu por bileto al Zwolle. Detalajn informojn petu de Thies M. Blaauw, Begoniastr. 2, Zwolle/Nederlando.

Faklingva Angulo

redaktita de G. Ritterspach (Daŭrigo 2)

Hodiaŭ, post plurmonata paŭzo, reaperas daŭrigo. Ĝi helpu al vi bone kompreni la valoregan fakprelegon de Avignon pri „La francaj fervojoj kaj la grandaj rapidoj“, kies kompleta teksto aperis en LIF n-roj 3, 4 kaj 5/1969. El abundo da klarigendaj terminoj mi elpikis dekduojn kaj mi volas ilin laŭalfabete ne nur traduki sed iomete klarigi per aldona frazo.

— Adhereco = Haftreibung, das Haften der Räder auf den Schienen. La adhereco de pneŭmatiko sur ŝoseo estas trioble pli granda ol la adhereco de ŝtala rado sur relo.

— Aerĝlita motorvagono = Luftkissentriebwagen. Inter la avangardaj fervojprojektoj tiu de aerĝlitaj veturiloj estas plej

revolucia.

— Arĉotroleo = Stromabnehmer(-bügel). Tra arĉotroleo la elektraj trakciiloj estas provizataj per energio. Ekzistas pantografa kaj unugamba arĉotroleo (Scheren- und Einholm-Stromabnehmer).

— Dentoradara rilatumo = Übersetzungsverhältnis des Zahnradgetriebes. Per ŝanĝo de la dentoradara rilatumo oni povas fari rapidtrajan lokomotivon el vartrajna lokomotivo.

— Flulinia aranĝo = Stromlinienverkleidung. La flulinia aranĝo ĉe grandaj rapidoj esence malpli altiĝas la aerodinamikan reziston (Luftwiderstand).

— Katenario = Kettenfahrlitung. Por provizi elektran trakciilon per energio tra arĉotroleo necesas supertraka konduktilaro. Ĝi estas plej ofte en ĉenformo aran-

ĝita kaj tiam nomiĝas katenario. Ĉefparto estas la kontaktodrato (Fahrdrabt).

— Kuratingo = Einholen. Rapide veturanta trajno kuratingas malpli rapidan trajnon antaŭe startintan. Por preterpaso necesas flanktrako.

— Motorvagono kun klinebla kesto (pendola vagono) = Triebwagen mit gleisbogenabhängiger Wagenkastensteuerung (GST). Per ĝi oni povas parte aŭ tute egaligi la flankan centrifugan forton en rapide traveturataj relvojkurbiĝoj.

— Parazitaj movoj = Schlingerbewegungen. Eĉ sur absolute rekta kaj bone prizorgita traksekcio rapida trajno ne veturas senŝancele pro ambaŭflankaj parazitaj movoj.

— Rapido komerca = Reisesegeschwindigkeit, rapido meza = Durchschnittsgeschwindigkeit. La me-

zan rapidon oni kalkulas inter du haltoj de trajno, dividante la distancon per la veturdaŭro; la komerca rapido de trajno inkluzivas ankaŭ ĉiujn haltojn inter la elir-kaj la celsacio.

— Relkromalto = Schienenüberhöhung. Teorie oni povus tute nuligi la centrifugan forton en trakkurbiĝo per la relkromalto sed ĉar la trajnoj surniaj linioj veturas malsamrapide (kaj eventuale eĉ haltas en kurbiĝo) ĉiam restas nesufiĉo de relkromalto (Fehlbetrag an Überhö-

hung).

— Termo = Größe (math.) Matematika formulo konsistas el diversaj termoj; konataj estas faktoro, divizoro, frakcio ktp.

— Urbo-aglomeraĵoj = Großstadtballungsräume. Grandurboj etendiĝas kvazaŭ oleomakuloj; se aliaj urboj estas proksimaj, ili kunkreskas kaj formas aglomeraĵon.

Kaj nun, kara leganto, relegu en LIF pri „La francaj fervojoj kaj la grandaj rapidoj“, vi certe profitos el tiu aktuala kaj interesa teksto.

Maturrec-ekzameno por aŭtomata vagonkuplilo

(dbp) Nuntempe survoje en okcidenta Germanio estas fakula komisiono de UIC (Parizo) kaj OSJD (Varsovio) per eksperimenta trajno, kies vagonoj estas ekipitaj ekskluzive per centraj bufrokupliloj. Oni deziras dum esplorveturado surloke observi kaj provadi sub plej diversaj kondiĉoj la aŭtomatan vagonkuplilon, kiun pluraj eŭropaj fervojoj kaj fabrikoj komune evoluadis, dum la lastaj jaroj. Kelkajn semajnojn antaŭe okazis simila demonstraciado en orienta Germanio pri la koncerna kuplilprojekto de la orient-eŭropaj fervojkompanioj.

Ankoraŭ dum tiu ĉi jaro oni volas teknike akordigi la diferencojn inter la du solvoj de la problemo, atingitaj en oriento kaj okcidento, por ke post ĝenerala ekaplikado de centraj bufrokupliloj oni povu kunkupli la fervojajn vagonojn en tuta Eŭropo ĝis inkluzive Sovetunio.

Laŭ la nuna tempoplano oni volas komenci la enkondukadon de tiu moderna vagonkuplilo je Pasko 1976.

Ritterspach

Koresponddeziroj:

Mirko Zlatkovic, Marŝala Tita 17, Lapovo (Jugoslavio) deziras korespondi kun germanaj kolegoj. Václav Ružička, Deĉin VI, Kraenstudenecká 731/69 (Ĉeĥoslovakio) serĉas korespondanton, kun kiu li povas interŝanĝi fotojn de lokomotivoj aŭ aliaj fervojmotivoj.



Werner Heimlich

Mitteilung des Vorstandes

Unter Leitung des 1. Vorsitzenden trafen sich der GEFA-Vorstand und Mitglieder des Arbeitsausschusses Esperanto im BSW am 20. 12. 1969 in Duisburg zu einer ganztägigen Besprechung. Der IFEF-Kon-

Distrikt-komisiito en Hannover

1953 mi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto. Sed tiam, mi ĵus finis mian deĵoran ekzercon, mi vere ne havis emon por lerni ion. Sed kiam ĉe mia edzino, ŝi esperantiĝis en 1953, estis finna amiko, mi konstatis kiel bona lingvo estas Esperanto. Tial ankaŭ mi esperantiĝis en 1954.

Jam 1954 mi fondis la grupon en Soltau. Post fino de kurso ĉe la fervojo mi ankaŭ tie fondis grupon en 1955. Dum tiu tempo mi kun bedaŭro konstatis, ke la intereso ĉe niaj kolegoj por Esperanto ne estas.

De 1957 ĝis 1962 mi estis kasisto de la distrikto Hannover kaj ek de 1962 mi estas komisiito de tiu distrikto.

Ek de 1959 mi transprenis la prizorgon de la migranta ekspozicio, kiu jam estis parte montrita en diversaj distriktoj. 1960, dum la jarkunveno en Trier, mi sukcesis la ekzamenon pri lingva kapableco. Ek de la sama jaro mi estas delegito de UEA.

En 1964 mi estis sekretario en LKK por la Germana Kongreso en Soltau.

1966 mi aranĝis la 10an jarkunvenon de GEFA en Uelzen. Mi vizitis kelkajn kongresojn de UEA, SAT kaj IFEF. Krome mi partoprenis ĉiujn jarkunvenojn de GEFA.

Kiel kolektanto mi havigis kolekton de pm kaj -stampoj pri la temo Esperanto. La kolekton mi jam kelkfoje ekspoziciis kun sukceso.

groß in Rimini, unsere Jahresversammlungen und die Möglichkeiten der Mitgliederwerbung durch eine umfangreiche Plakataktion waren die wichtigsten Punkte der umfangreichen Tagesordnung.

El la grupoj

Münster/Vestfaliao

Jaŭdon, la 6an de novembro 1969 la Fervoĵista Esperanto-Rondo kune kun la Monastera Societo Esperantista aranĝis malgrandan feston por inaŭguri sian novan kunvenejon, kiu estas ankaŭ destinita por la aliaj libertempaj grupoj en la fervoja sociala organizo. Post dudek-jara vagado inter deko da kunvenejoj la grupo fine disponas pri konvena, sufiĉe granda salono, kiu taŭgas ne nur por grupvesperoj, sed ankaŭ por aranĝi kursojn kaj filmprezentojn.

20 personoj el Münster, Osnabrück kaj Burgsteinfurt sekvis nian inviton. S-ano Brandenburg kiel prezidanto de la loka societo parolis pri la evoluo de la Esperanto-grupo en Münster. La unuaj kunvenoj post la dua mondmilito somere okazis sur unu benko en la kastela ĝardeno aŭ dum vintro en la loĝejo de grupano. Post unua kurso, aŭtunon 1949, en la Fervoja Faklernejo kun pli ol 30 partoprenantoj, la plej multaj grupanoj estis fervoĵistoj, la grupo sekve gastis en la konstruaĵo de la fervoja direkcio.

Plurajn jarojn la regulaj kunvenoj okazis en ĉambro de la stacidomo, kie dum la GEFA-jarkunveno servis ankaŭ la akceptejoj. Pro organizaj ŝanĝoj en la fervoja administracio ankaŭ tiu kunvenejo estis konfiskata kaj la denova senhejmeco multe malhelpis la societatan laboron.

La gaja rondo pasigis ankorau kelkajn belajn horojn per babilado ĉe kafo, kuko kaj vino. Novaj planoj maturiĝis pri estonta praktikado. Pluraj novaj membroj aliĝis dum tiu vespero: G. Doliwa, jam ne fervo-

jisto, sed studenta pedagogion en Münster, hispana kuracisto deĵoranta en la universitata servo, kaj la okjara Judita, kiu de sia beba aĝo parolas nian lingvon por ĉiutaga uzo kaj kiu ankaŭ estis desegninta la invitkartojn. Nur preskaŭ meznokte oni disiris hejmen.

La nova kunvenejo, kie la grupo nun regule renkontiĝas ĉiujaŭde je la 20.00 h, favore situas apud la stacidomo, orienta flanko: BSW Ortsstelle Münster (Westf.) KULTURRAUM, Hamburger Straße 2.

La ĉi-tempa programo krom raportoj pri diversaj internaciaj aranĝoj prezentas ankaŭ kulturajn kaj politikajn aktualaĵojn, enhavas diskutojn, korespondon, prelegojn kaj muzikprezentojn. Schrapp

Informoj

22-a IFEF-kongreso en Rimini

La aliĝiloj nun estas mendebla ĉe via distriktkomisiito (vidu Bulteno 6/69). La provizora programo estas legebla en LIF 6/69 paĝoj 94/95. Limtempo por anoncoj: 30. 4. 1970

Wuppertal

Zamenhof-festo kaj GEFA-kunveno en Schwelm

La Esperanto-grupoj

Schwelm kaj Wuppertal festis sian Zamenhof-vesperon kune kun la fervoĵistaj esperantistoj el la direkcia distrikto Wuppertal la 7an de decembro 1969 en la gastejo Ellinghaus en Schwelm. Krom gastoj el Barcelona kaj Nürnberg ĉeestis la juna japanino Kazue Sugawara, kiu dum sia kvinmonata vojaĝo tra 20 landoj restadis la kvaran fojon en Schwelm.

La direkcia komisiito Graß salutis en la nomo de GEFA kaj de la socialorganizado de la fervojo kaj ĝojis, ke preskaŭ triono el la 60 partoprenintoj estis GEFA-anoj. Anton Krons-hage, kiu jam de kvar jarojn gvidas la esperantokursojn en la schwelma popolaltlernejo, raportis pri la laboro de la loko grupo kaj alvokis la ĉeestantojn labori en la senco de Zamenhof por la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj speciale subteni la agadon „Testo 5000“ = la programitan Esperanto-kurson de H. Behrmann el Löhne.



Zamenhof-festo en Schwelm

Kulmino de la vespero estis la diskuto kun la japana gastino. La dudek-tri-jara japanino komencis antaŭ du jaroj lerni Esperanton, nun bone kaj flue parolas ĝin kaj raportis pri sia vojaĝo. Post la UK en Helsinko ŝi vizitis la nordajn landojn kaj venis al Germanio. Helpe de Esperanto — ŝi ne scipovas fremdajn naciajn lingvojn — kaj la „Eurail-ticket“ ŝi vizitis dum tri monatoj la ĉefajn vidindaĵojn en la „Malnova Mondo“. Specialan travivaĵon s-ino Kazue havis en Schwelm dum la urba festo en septembro pasintjare. La urbestro Homberg prezentis nian gastinon al la federacia prezidanto Gustav Heinemann kaj ebligis rigardi la grandan festprocesion de sur la tribuno por honoraj gastoj. Dum siaj pluaj vojaĝoj ŝi vizitis inter alie Hispanion kaj Marokon. Hejmveturante trans Italio kaj post mallonga paŭzo en Schwelm sekvis la lasta etapo Bulgario, Jugoslavio, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.

Post la vespermanĝo s-ino Anneliese Köhler montris lumbildojn pri la GEFA-kongresoj Neustadt/Vinstrato kaj Augsburg, kie 5 resp. 6 gekolegoj el Schwelm partoprenis. Plue ŝi montris diapozitivojn el Avignon faritajn de Klaus Hegenberg, kiu samtempe unuafoje reprezentis kiel junular-komisiito en Paris okaze de la franca fervojista Esperanto-jarkunveno.

La kulmino de la amuza parto estis tombolo. Fervojisto el Hagen gajnis la ĉefpremion, unu botelon da „Esperanto“-ŝaumvino kaj pokalon. Ilin ambaŭ li donis al nia japana amikino, kiu tre ĝojis kaj volis kunporti ĉion al Japanio kiel memorajon. Nia juna membrino Dagmar Blaschke el

Wuppertal akompanis per gitaro la popolkantojn en Esperanto de la schwelma Esperanto-junularo. Ĝis preskaŭ meznokto restis prefere la junularo por kanti, danci kaj babilu kun nia gastino el Japanio.

Ciuj tri schwelmaj gazetoj raportis favore pri la sukcesplena vespero, unu eĉ sur duona gazetpaĝo kun bildo. Finfine dankon al la fervoja socialorganizo Wuppertal, kiu subtenis la kunvenon finance. Schindler

Stuttgart

En la kadro de semajnfina renkontiĝo de la naturamikaj esperantistoj ankaŭ la fervojista grupo Stuttgart partoprenis la 8an/9an de novembro 1969 kiel gastoj en la naturamika domo Dettingen/Erms ĉe Urach (Schwäbische Alb). Sabaton vespere oni aranĝis lumfesteton por infanoj kaj prezentis filmojn pri fabeloj. Poste ni havis prelegon per koloraj diapozitivaj pri vojaĝo al ĈSSR kaj diskutis Esperanto-problemojn.

Dimanĉon ni migris en la aŭtuna pejzaĝo de Schwäbische Alb, vizitis inter alie la ruinojn Hohenurach kaj instruan vojon — la signifo de plantoj kaj bestoj estas idikita sur tabuloj de paŝo al paŝo — en tiea arbaro. Posttagmeze ni adiaŭis por denove laborriĉa semajno. Kiefer

Vigla diskutado kun sindikata junularo

La 24an de novembro la vicprezidanto de GEFA, Joachim Gießner, faris prelegon antaŭ proksimume 50 gejunuloj en Bad Marienberg/Westerwald. Ili tie kunvenis en kadro de „Eŭropo-seminaro“, aranĝita de la Sindikato de germanaj fervojaj oficistoj kaj aspirantoj (GDBA). Temo

de la prelego estis „Esperanto kaj nia tempo“. La preleganto aldonis per sonbendo mallongajn diskoekstraktaĵojn el Esperantoleciono, el kongresparolado de prof. d-ro Lapenna, el diversaj ŝlagroj kaj poemo de I. Baghy. Sekvis preskaŭ unuhora diskutado, kiu nur devis finiĝi pro la venonta programero. Kompreneble ankaŭ estis disdonitaj niaj varbiloj. „Esperanto, die Sprache, die Sie suchen“. Ni dankas al la sindikato, ke ĝi donis eblecon prezenti la gravegan problemon de internacia lingvo ĝuste al gejunuloj, kiuj tutan semajnon okupiĝis pri la same grava problemo „Eŭropo“. Gi

Esperanto-Test

Die von cand. paed. Hermann Behrmann, 4972 Löhne-Obernbeck, Bahnhofstraße 54, unternommenen Versuche den Esperanto-Unterricht zu programmieren, haben beachtenswerte Erfolge gezeigt. Bis Mitte Oktober 1969 haben ca. 2850 Interessenten das Testmaterial mit Aussprache-Schallplatte unverbindlich und ohne Kaufverpflichtung angefordert. Der Initiator dieser erfolgreichen Idee hat sich über Anzeigen und Kommentare vieler Tageszeitungen an die Öffentlichkeit gewandt. In einigen erfolgversprechenden Gegenden empfiehlt er zur Unterstützung der laufenden Werbekampagne eine Zeitungsbeilage, die von ihm entworfen wurde. Dieser Prospekt, der sich ebenfalls zum Aushang bei den Dienststellen eignet, ist dem Bulteno beigefügt. Das Lehrmaterial, das zum Selbstkostenpreis erworben werden kann, wird nach Überarbeitung der Textfassung zum Selbststudium bereitstehen.

Esperanto-Sprachprüfungen heute

Die Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes (DEI) hat bekanntlich 1967 das deutsche Esperanto-Institut (DEI) aus der Taufe gehoben.

Bereits 1968 hat DEI eine neue Prüfungsordnung bekanntgegeben. Nachstehend wird versucht, das Wesentliche dieser Prüfungsordnung herauszustellen. Da sich bei den GEFA-Jahresversammlungen immer wieder Esperantisten für eine Sprachprüfung melden, wird ein Aufruf der neuen Prüfungsordnung sicherlich willkommen sein.

Die **Prüfungen** gliedern sich in einen schriftlichen und in einen mündlichen Teil. Jeder Prüfling muß die Prüfung im ganzen ablegen; einzelne Teile der Prüfung können nicht erlassen werden. Hilfsmittel (Wörterbücher u. a.) sind nicht zugelassen. (Ausnahme: Wörterbuch für den Aufsatz in Esperanto).

*

Prüfungsarten

1. **Kursabschlußprüfung** (kursfina ekzameno) als Nachweis darüber, daß der Bewerber den im Lehrgang durchgenommenen Stoff beherrscht und in mündlicher und schriftlicher Form anzuwenden versteht.
2. **Sprachprüfung** (ekzameno pri lingva kapableco) als Nachweis über die Fähigkeit, sich in Esperanto mündlich und schriftlich **hinreichend** zu verständigen.
3. **Höhere Sprachprüfung** (supera ekzameno pri lingva kapableco) als Nachweis über die Fähigkeit, Esperanto **fließend zu sprechen** und **einwandfrei und gewandt zu schreiben**.

Prüfungsanforderungen

Zu 1.:

Der Bewerber hat unter Aufsicht einen einfachen, kurzen **Esperanto-Text ins Deutsche** und einen einfachen kurzen deutschen Text in Esperanto zu übertragen, dazu ein einfaches, kurzes **Esperanto-Diktat** aufzunehmen.

Zu 2.:

Diese Prüfung gliedert sich in einen schriftlichen und in einen mündlichen Teil. Im schriftlichen sind ein einfacher Esperanto-Text ins Deutsche und ein einfacher deutscher Text ins Esperanto zu übertragen, ein einfacher Esperanto-Text als Diktat aufzunehmen und ein kleiner Aufsatz in Esperanto über eines von 3 zur Auswahl gestellten Themen zu schreiben. Bei der mündlichen Prüfung hat der Bewerber in einer Unterhaltung über ein Thema aus dem täglichen Leben die Fähigkeit im mündlichen Gebrauch der Sprache nachzuweisen und eine einfache Unterhaltung in Esperanto (zwischen den Prüfern) ins Deutsche zu übertragen.

Zu 3.:

Bei der höheren Sprachprüfung sind die Texte entsprechend schwieriger gehalten, eine Unterhaltung in Esperanto und eine Dolmetscherübung aus dem Deutschen ins Esperanto und umgekehrt vorgesehen; zum Prüfungsgebiet gehören außerdem Esperanto-Grammatik, Esperanto-Literatur, Kenntnisse über das Sprachenproblem und die Geschichte der Esperanto-Bewegung.

*

Prüfungsbeauftragte

Die **Kursabschlußprüfung** wird durch den Lehrgangsleiter und einem Prüfungs-

beauftragten durchgeführt. Für die Abnahme der Sprachprüfung und der höheren Sprachprüfung werden vom DEI besondere Beauftragte bestellt.

*

Zulassung zur Prüfung

Für die Kursabschlußprüfung ist eine mündliche oder schriftliche Meldung an den Lehrgangsleiter zu richten. Die Zulassung wird formlos mitgeteilt. Für die Zulassung zur **Sprachprüfung** und zur höheren Sprachprüfung muß sich der Bewerber an eine Prüfungskommission wenden. Dieser Kommission sind spätestens 4 Wochen vor einer Prüfung einzureichen: a) ein in Deutsch geschriebenes Gesuch um Zulassung, b) ein selbstverfaßter Lebenslauf in Esperanto (Geburtsort, Geburtsdatum, Bildungsgang, Tätigkeit für Esperanto, genaue Anschrift).

Von der Zulassung zur Prüfung werden die Bewerber schriftlich benachrichtigt.

*

Prüfungsgebühren

Prüfungsgebühr für die **Kursabschlußprüfung** (einschließlich Zeugnisausstellung) 2,— DM, für die **Sprachprüfung** 10,— DM und für die **höhere Sprachprüfung** 20,— DM. Zeugnisgebühr = in den beiden letzten Fällen 2,— DM. Eine nicht bestandene Prüfung kann beliebig oft wiederholt werden. L

*

Stacidomo serĉataj

Mi kolektas bildkartojn de stacidomoj. Ĉiu, kiu sendas al mi tian bildkarton, ricevos rekompence bildkarton pri lokomotivo.

Herta Trumpf
Friedrich-Ebert-Str. 17
D-2945 Cäcilienroden

Turismo

Svislando

Pri la 12-a Europa-Feriosemajno de 23-a ĝis 29-a de aŭgusto 1970 informas Ernst Glättli, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg

Bonan vojaĝon

estas titolo de belega multkolora broŝuro en Esperanto eldonita de Finnlanda Stataj Fervojoj kiel varbilo por la ĉiam kreskanta fremdultrafiko en la „lando de mil lagoj“. Sambonega estas ankaŭ la koloraj faltfolioj „amika Finnlando“ kaj „Helsinki, filino de Balta maro“ eldonitaj de: Turisma oficejo de la urbo Helsinki, Pohjoinen Esplanadikatu 19, Helsinki 10. **Bonvenon en Aŭstrujo!** Kolora faldfolio, 10×21,4 cm. Eldonita, antaŭvide al la venontjara UK, de Aŭstra Turistagentejo kunlaboro kun Aŭstria Esperanto-Movado, A-1010-Wien-Hofburg.

Wien. 19,5×19,5 cm. Tre bela kolora faldfolio pri la urbo de la 55-a U.K. Eld. kaj informojn donas Fremdenverkehrsverband für Wien, Stadiong. 6-8, A-1016 Wien.

Kralice n. Osl. — turisma faldfolio en Esperanto, 10×21 cm. Havebla: Kleriga Domo de B. Václavek en Trebič.

Kronach mezepoka urbo en Nordbavario. Petu prospektojn de la turisma oficejo: Verkehrsamt, D-864 Kronach/Germanujo.

Francujo Novaj Esperanto-prospektoj ekzistas de **Le Vivarais (Ardèche)** = Sindikato de Iniciativo de Vals kaj Vivarais,

Romans sur - Isère = Syndicat d'Initiative, F-26 Romans Place Jules-Nadi,

Vienne en Delfinio = Syndicat d'Initiative, Vienne, Place Saint-Pierre,

Vichy = Syndicat d'Initiative, Vichy, 19, rue du Parc,
Nîmes „La Franca Romo“ = Syndicat d'Initiative de Nîmes et du Gard F-30 Nîmes, Boulevard de Prague,
Nancy = Turisma Servo, Nancy, 9, rue des Dominicain,
Calais = Syndicat d'Initiative, Calais

Skotlando

Petu prospekton de: Scottish Tourist Board, 2 Rutland Place, Edinburgh 1, GB, aŭ: Information Bureau, Georg Square, Glasgow GB

Nederlando

Amsterdama muzeo BIBLIO kaj ARKEOLOGIO invitas al vizito. Gvidado en Esperanto. Pri detaloj informas: Biblia muzeo de antikvaĵoj, Stadhouderskade 137, Amsterdam - 1008

Ĉeĥoslovakio

Internacia konferenco pri J. A. Komensky omaĝe al 300 jara mortdatreveno de la eminenta pedagogo kaj pensulo (25.—30a de julio 1970). Programon kaj informojn petu de: Muzeum J. A. Komenského, PhDr. Gustav Vožda, direktoro, Horni nám.. č. 1, Prerov

Italujo

Por vizito al Sud-Tirola invitas: Franz Knoflach, Aichweg 3, I-39019 Dorf Tirol apud Meran. Bonvolu kiel eble plej frue anonci vin!

Trilanda Esperanto-kongreso

En la kadro de tiu kongreso (anoncita en Bulteno 6/69) planas k-go Brandenburg sabaton la 28an de marto 1970 posttagmeze fervojistan kunvenon. Post interkonsento kun niaj belgaj kaj nederlandaj gekolegoj la programo temos pri „Inter Avignon kaj Rimini“ kontaktoj, evoluo, faklingva laboro, kaj „Memoroj tra du jardekoj de IFEF“ (dia-bildprezento).

Anoncetoj

Hungario

Senpagan gastigadon proponas reciproke interŝanĝe: Fervojista fakgrupo de la hungara Esperanto-asocio, Kiskunhalas

Ĉeĥoslovakio

Mi serĉas geamikojn en Germanujo. Kiel 23-jara instruistino mi interesiĝas pri la vivo en via lando, muziko kaj literaturo. Libuše Hájková, Valašská Bystrice 316 okres, Vsetin

Humoro

„Nu, kelnero, kion diris mia edzino, kiam vi alvokis ŝin, ke mi nur venas du horojn pli poste?“
„Si diris: Jes, bonege. Cu mi ankaŭ povas fidi tion?“

Ni legas por vi

Kial mi kredas je l'Islamo

Tiu broŝuro entenas radioparoladon, per kiu Hazrat Mirza Baŝruddin de la Ahmadiyya-Movado, motivigis kiel elstara reprezentanto sian kredon je l'Islamo. La modelan tradukon prizorgis prof. d-ro Chiussi, kies altkvalita traduko de la „Nobla Korano“ atingis intertempe jam famon en Esperantujo.

La aŭtoro klopodas pravi, ke la ideala konduto dumviva devige kondukas al la islama kredo. Surpriza estas la simileco inter tiu argumentado kaj tiu jam konata inter la kristanaro. Tamen konsiderante la nunan situacion de la arabaj landoj, en Sudano aŭ en Israelo, leviĝas la demando por la praktika vivo, kion signifas frazoj kiel la jena: La Islamo instruas, ke neniu nacio rajtas peki kontraŭ alia, nek ŝtato kontraŭ alia.

La 15paĝa broŝuro estas havebla kontraŭ antaŭsendo de 0,30 GM (afranko) ĉe Libroservo Ludwig Pickel, p. f. 2113, 85 Nürnberg.

W. B.

Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanta Fervojista Asocio en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo

Stato: Januaro 1970

Estraro

Prezidanto: TBOI Brandenburg, Hbm Münster (Westf.); Basa 945/397 aŭ 1391

Vicprezidanto: BAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

Unua sekretario: BOI Rösemann, GV Osnabrück; Basa 945/822/357
Dua sekretarino: BHS in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 511; Basa 955/3280

Redaktoro: BAmtm Graß, BD Wuppertal -T-Büro T 101-; Basa 946/468 aŭ 1407, privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstr. 13
Kasisto: BHS Jentsch BA Darmstadt; Basa 955/866/1124, ek de 1. 3. 70 BHS a. D., Bf Ober-Ramstadt ĉe Darmstadt

Apartaj komisiitoj

Lingvaj ekzamenoj: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

Instruado: BOAMtm a. D. Jäger, 6 Frankfurt/Main, Felix-Dahn-Str. 6; poŝtelefono 515123

Fakterminaroj: BAmtm Ritterspach, Tarifamt Frankfurt/Main, AA TA 40; Basa 955/2239

Junularferoj: Bass Hegenberg, Bf Schee (Wuppertal); Basa 946/651/14

Biblioteko kaj gazetkolektado: BI Rösemann, GV Osnabrück; Basa 945/822/357

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf Schwelm (Wuppertal); Basa 946/848/388

Arkivo: BS Barmaneter, Bf Worringen (Schwaben); Basa 946/824/365

Zamenhof-festo en Löhne

Löhne estas (por fervojistoj) la centro de la mondo. Ankaŭ la 14-an de decembro 1969 estis Löhne gravega loko, sed en tiu ĉi kazo por esperantistoj (kompreneble ankaŭ fervojistaj). Hermann Behrmann, la konata aŭtoro de la sukcesa programita Esperanto-kurso, aranĝis tie la ĉi-jaran Zamenhof-feston kun granda sukceso. Partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj. Kelkaj geknaboj kantis kaj muzikis. La festparoladon faris rek-

Distriktkomisiitoj

Augsburg: B. Arb. Schmid; Basa 964/1745 aŭ 965/1318 (edzino Schmid)

Essen: BOAMtm Schnetzer, Bf Hamm (Westf.); Basa 944/807/391

Frankfurt/M: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

Hamburg: BAmtm Lepke, BD Hamburg — B-Büro —; Basa 947/5569

Hannover: BHS Heimlich, Bm Soltau; Basa 949/850/127

Karlsruhe: BAmtm Hug, BD Karlsruhe — Ps-Büro —; Basa 953/5005

Kassel: BHS Tasler, BD Kassel — Ps-Büro —; 957/2158

Köln: BHS Mester, Ga Rheydt Hbf; Basa 943/882/75/105

Mainz: Gep. Arb. Hans, Gepa Neustadt / Weinstraße; Basa 954/866/124

München: OLOkf Gißibl, Bw Garmisch-Partenkirchen; Basa 962/821/365

Münster: BAmtm Schrapp, BD Münster (Westf.) — P-Büro — P 2; Basa 945/1171

Nürnberg: BOS Müller, Bahnpolizei wache Bamberg, Bp-Posten Lichtenfels; Basa 966/844/388

Regensburg: TBOI König, AW Weiden; Basa 965/829/622

Saarbrücken: BOS Haupenthal, Ga Saarbrücken Hgbf; Basa 956/5429

Stuttgart: BOI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —; Basa 952/5625

Wuppertal: BAmtm Graß, BD Wuppertal — T-Büro T 101 —; Basa 946/468 aŭ 1407

toro H. Sonnabend (Dollbergen). Li parolis pri la Internacia Lingvo en lernejoj. S-ro Heinrich Müller (Hannover) ĝojigis la partoprenintoj per sia diaprelego. Dum la tuta Zamenhof-festo partoprenis ankaŭ la urbdirektoro de Löhne. Li montris grandan intereson por la Internacia Lingvo. La festo evidentiĝis, ke en la regiono Bielefeld, Osnabrück, Löhne, Minden kaj Hannover ekzistas vigla Esperanto-vivo. - roe -

Peto al la eksterlandanaj geamikoj!

Ĉi maldekstre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estranaroj kaj de la distrikataj komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia Bulteno, ni urĝe petas informi nian unuan sekretarion, s-ro Otto Rösemann, Generalvertretung der DB 45 Osnabrück.

Anoncoj

Tutkore ni dankas por ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj. Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungen des Vorstandes

Jahresbeitrag

Unsere Vereinigung und vor allem IFEF sind auf Ihren Jahresbeitrag angewiesen. Bitte, überweisen Sie diesen baldmöglichst an Ihren zuständigen Bezirksbeauftragten, dem Sie auch mitteilen wollen wohin Bulteno und LIF zu senden sind, falls sich in der Zwischenzeit Ihre dienstliche Anschrift geändert hat.

Korespondeziri

Fakdelegito de UEA pri turismo deziras korespondi pri ĉiuj temoj, speciale pri naturo kaj ekskurso. Skribu al: S-ino Rajna Kasaboda, str. Kiril i Metodi 84, Sumen/Bulgario.

„Hierau mi faris prelegon al mia edzino pri sparemo“

„Kaj — ĉu vi sukcesis?“

„Jes, kaj kiel — mi ne plu fumas.“

La malgranda Kurt vokas: „Panjo bonvolu tuj veni kun mi, en la ĉambro de mia fraŭlino estas fremda viro kaj kisas ŝin.“

La patrino rapidas. La knabo malfermas la pordon kaj ridas: „Aprilo, aprilo, ne estas fremda viro, — estas la patro.“

Maier jus ankoraŭ povis flankensalti. „Vil! Atentu nurl!“ vokis la indignita aŭtomobilisto.

„Kial“ demandis Maier. „Ĉu vi tuj revenos?“

Trad: E. K.
Redaktionsschluss für die Ausgabe 2/1970 ist der 25. 3. 1970.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck /
preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug
ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La
abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.